Ewa kaj Lidja

...daŭrigo de paĝo

Ŝi tute ne interesiĝis pri medicino kaj malkiel la gefratoj, Adamo kaj Sofia, ne pensis pri tio, kion ŝi volas fari en la estonteco. En la lasta Universala Kongreso antaŭ la dua mondmilito, kiu okazis en Bern en Svislando, Lidja Zamenhof ne povis partopreni. Tre baldaŭ, la 1-an de septembro 1939, eksplodis la milito. Kaj venis terura tempo. La unua arestito estis Adamo, la frato de Lidja. La saman tagon oni arestis la edzinon de Adamo, Wanda, kaj la fratinon Sofia.

Renkontiĝo en la geto

Ewa Toren loĝis en la geto proksime de Zamenhofoj. Ŝi konis Lidja kaj renkontis ŝin preskaŭ ĉiutage. Ŝi atendis ŝin, kiam Lidja revenis el la laboro. Ewa estis tiam nur 14-jara. Ŝi ne konsciis tiam, ke Lidja Zamenhof estas elstara esperantistino, filino de la kreinto de la internacia lingvo. Ŝi konis Lidja dum tro mallonga tempo. Apenaŭ. Foje, kiam ŝi renkontadis ŝin, ŝi mallonge interparolis. Jen kiel pri sia konatino diras Ewa: – Ŝi estis alia ol ĉiuj. Trankvila kaj spirit-ekvilibra.

Ewa kun la patrino iam partoprenis paskan matenmanĝon ĉe amikoj. Tie ŝi renkontis Lidja kaj tre ĝojis pro tiu fakto, ĉar povis esti pli proksime al la konatino kaj pli bone ekkoni ŝin. Tamen tio estis la unua kaj la lasta renkontiĝo en tiu aro. Ewa Toren sukcesis supervivi la geton. Ŝi decidis eskapi. Ankaŭ al Lidja Zamenhof oni proponis helpon, sed ŝi ĉiufoje rifuzis. Ŝi kredis, ke ŝi ne povas ŝanĝi la sorton kaj decidis iri kun la amikoj, veturi al Treblinka. Kaj tio okazis.

Tio estis en nokto

- Tio estis en nokto inter la 4-a kaj 5-a de septembro – rememoras s-ino Ewa. – Germanoj kriis sur la korto „raus, raus" kaj ordonis al ni eliri la domon. Ĉirkaŭ la kvara horo ili devigis nin ekstari en vicoj po 5 personoj. Mi staris kun la panjo, kelkajn vicojn post Lidja. La germanoj elektis homojn el la vicoj. Ili kriis „links, links" kaj batis per vipoj. La

homoj kolektiĝis, ploris, kriis pro timo, kaj oni pafis al tiuj, kiuj hezitis. La vidaĵo estis terura. En certa momento furioza germano fortiris Lidja, starantan fiere en la vico, kaj helpante sin per vipo puŝis ŝin maldekstren. Ŝi ankoraŭ sukcesis rigardi en nia direkto. Mi ne vidis timon sur ŝia vizaĝo. Al ni oni permesis reveni hejmen, kaj la elektitoj estis forveturigitaj al Treblinka.

Sinjorino Ewa kun grupo da fuĝantoj eskapis el la geto. Antaŭ ol fine ekloĝi en Israelo, kie ŝi pasigis plurajn jarojn de la vivo, ŝi trapaŝis kruelan vojon de timo, diskriminacio kaj malcerteco. Nun ŝi loĝas en Svislando. En printempo 2019 ŝi festis la 91-an naskiĝtagon. En la Domo de Helpo, en kiu ŝi ektroviĝis pro malsano, vizitas ŝin multaj amikoj el la tuta mondo.

(sed)

Tra la Mondo en interreto

Nia nova magazino (ankaŭ la numero „0") estas alirebla ankaŭ en elektronika versio. Oni povas legi ĝin ĉe la retpaĝo de Fondumo Zamenhof: **www.fondumozamenhof.pl**

Ni atendas viajn rimarkojn, proponojn de temoj kaj aliajn sugestojn pri la nova gazeto. Diru al ni kio plaĉas al vi kaj kion necesas urĝe ŝanĝi.

Vi povas korespondi kun ni per la retadreso **fondumo@gmail.com** aŭ per papera poŝto ĉe la adreso: Fondumo Zamenhof, 15-282 Białystok, ul. Piękna 3. Plej interesajn leterojn ni publikigos

La redakcio

Tra la Mondo

Forpasis Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof

Li mankos al ni

...daŭrigo de paĝo

Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof de la komenco de la Fondumo partoprenis en ĝiaj laboroj. Li estis aktiva membro de teamo, kiu laboris je sekvaj planoj por krei en Bjalistoko la Mondan Esperanto-Centron, kaj intertempe li estis aktiva ĉe aliaj projektoj.

Medalo de Toleremo

– La ideo pri ĉi tiu premio naskiĝis dum verkado de la libro „La Zamenhof-strato" – rakontas Roman Dobrzyński. – Mi verkis ĝin en la formo de intervjuego kun d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto, kaj samtempe fama konstru-inĝeniero precipe de grandaj maraj objektoj. Priparolante la unuan kunvenon de esperantistoj en 1905 en Bulonjo-ĉe-Maro ni pensis pri malagrablaĵo kiu tuŝis Ludovikon Zamenhof, kiam la francaj organizantoj malpermesis al li diri la vortojn: „Kristanoj, hebreoj kaj mahometanoj, ni ĉiuj de Di' estas filoj". D-ro Zaleski-Zamenhof, sentema je maltoleremo interalie kiel viktimo de la geto, kun simpatio sekvis la agadon de Johano Paŭlo la 2-a en la spiritio de la ideo de toleremo, ĝenerale komprenata kiel respekto je malsameco, ankaŭ je religiaj diferencoj. En la sama spirito la papo diris en kelkdek lingvoj, ankaŭ en Esperanto, sian benon urbi et orbi. Ni ekkonsciis kiom proksima al la pensoj de la papo estis la supre citita verso de Zamenhof kaj kiom forte ĝi ligiĝas kun la ideo de la Fondumo. Tiam ni ekhavis la ideon pri medalo, sur kiu estus gravuritaj la supraj vortoj de Zamenhof, kaj kiu estus eldonita de la Fondumo havanta lian nomon. La unua Medalo de Toleremo estis enmanigita al papo Johano Paŭlo la 2-a en Drohiczyn en 1999 dum ties vizito en Pollando.

Honora civitano de Bjalistoko

En 2007 Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof ricevis la titolon de honora civitano de Bjalistoko. La urba konsilio skribis en la alprenita decido pri la titolo argumentante:

– „Via avo kaj vi ellaboris bonan renomon por Bjalistoko en la tuta mondo. Bjalistokon oni asocias kun Esperanto, kun la famili-nomo Zamenhof. La ideo estas antaŭ ĉio reciproka frateco, interkonatiĝo de la homoj kaj la espero je pli bona morgaŭo" – substrekis en sia parolado la urbestro **Tadeusz Truskolaski**.

La nepo de la kreinto de Esperanto renkontiĝis kun esperantistoj kaj kun lernantoj de bjalistokaj lernejoj. Li vizitis la Esperanto-klubejon ĉe la strato Piękna, okazis, ke ni renkontiĝis ĉe tablo en bjalistoka restoracio aŭ ie en la mondo dum Universala Kongreso. Li ĉiam trovis tempon por renkontiĝi kun bjalistoka delegitaro, paroli ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri ordinaraj, ĉiutagaj aferoj. En 2009 li malfermis Centron Ludoviko Zamenhof ĉe la strato Warszawska. Li mankos al ni.

(S. Dobrowolski)

La entombigan solenaĵon, kiu okazis en Parizo la 17-an de oktobro 2019, partoprenis delegitaro el Bjalistoko gvidata de la vicurbestro Przemysław Tuchliński.

– Nome de la urbaj aŭtoritatoj kaj la tuta bjalistokanaro mi volas esprimi grandegan bedaŭron pro forpaso de s-ro Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof, elstara scienciisto, inĝeniero-konstruisto, kaj ankaŭ nelacigebla popularigantо de la internacia lingvo, kies meritojn por Esperanto ne eblas trotaksi – diris dum la entombiga solenaĵo Przemysław Tuchliński, vicprezidanto. – En ĉi tiu malgaja tago ni devas memori, ke forpasante li postlasas heredaĵon en niaj koroj kaj memoro. Mi estas certa, ke la heredaĵo de Zamenhof restos kun ni, kaj liaj laboro kaj atingoj estos daŭrigataj. Certe ĉi tio estos la plej belega formo de omaĝo.

Tra la Mondo, kvaronjara gazeto. Redakcop: 15-282 Bjalistoko, str. Piękna 3. Ĉefredaktoro: Stanisław Dobrowolski, tel. 606 74 20 33, retadreso: fondumo@gmail.com. Redaktas teamo. Kunlaborantoj: Paweł Dzienis, Małgorzata Komarnicka, Wiktor Lagutin, Katarzyna Lewończuk, Marek Łapiński, Anna Mocarska, Mariola Pytel, Przemysław Wierzbowski. Fotoj: S. Dobrowolski, pixibay, arkivo. Eldonanto: Fondumo Zamenhof, str. Piękna 3, 15-282 Bjalistoko, fondumo@gmail.com. Ni ne respondecas pri la enhavo de reklamoj kaj anoncoj. Ni rezervas por ni la rajton mallongigi la senditajn materialojn.